

Enskribo

pri la komitata kunveno okazinta la 3-an de aprilo 1962 je la 18a horo en nia klubejo en Malnova Urbodomo. Ĉeestis por Parko de Kulturo kaj Ripozo k-do Sklenář kaj el nia rondeto s-anoj: Vondroušek, Friedrich, Adamcová, Šikula, Borkovec, Kořínek, Konecká, Lorková, Bednařík, Kalina. Oni prezentas al k-do Sklenář niajn bezonojn, ĉefe ke ni bezonos havi je dispono ree nian bibliotekon kaj libroŝrankon. K-do Sklenář fine promesas aranĝi translokigon de ĝi al la Malnova Urbodomo, sed ni devos konsenti, se la ŝranko devos stari event. sur la koridoro. S-ano Vondroušek postulas ankaŭ la kesteton sur la Malnova Urbodomo, kiun k-ino Havlišová promesis. Kiam k-do Sklenář diras, ke tio ne estas probleo alifiksi la kesteton per du hokoj sur la muron, s-ano Vondroušek replikas, ke ni estus povintaj ĝin jam mem fari, sed k-ino Havlišová insistis, ke ili tion igos fari per propraj laboristoj. Plendon pri neebla necesejo en Malnova Urbodomo (komuna por viroj kaj virinoj) rifuzas k-do Sklenář, ke eĉ neniun eksterlandan vizitanton povus io simila ŝoki (se virina gasto devas trapasi viran pisejon por atingi la necesejon – kio tamen ŝajnas al ni skandala). Demandon de s. Adamcová, ĉu ni ne povus reveni al hotelo Slovan, kie ni havis 30 jarojn tre konvenan kunvenejon, rifuzas k-do Sklenář, ke tio estas nediskutebla, oni al neniun rondeton povas fari privilegion. Kiam ne estis pluaj postuloj al PKR pro alia laboro foriris je la 18.45 h k-do Sklenář. Poste oni traktis pri la teatraĵo la 23.IV. dum la vizito de hungaraj gastoj el Győr. S-ino Adamcová raportas, ke ŝi rezervigis al la gastoj la prezidantan loĝion en la teatro. S-ano Vondroušek petas anonciĝi la interpretistoj por la ekskurso al Győr. Fine s-ano Šikula proponas eldoni lignogravuran kliŝon por jubileaj markoj, kies prezo estus ĉ. 1 Kčs por peco. S-ano Kořínek opinias tiun prezon tro alta kaj oni diskutas, ĉu ne eblus eldoni poŝtkartojn kaj leterpaperojn kun la jubilea amblemo. S-ano Šikula ankoraŭ informiĝos pri la afero. S-ano Vondroušek ankaŭ sciigas, ke estas konsiderata ebleco en aŭtuno aranĝi Esp.-ekspozicion.

Finite je la 19.20 h.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la komitata kunveno okazinta la 15an de majo en nia klubejo en la Malnova Urbodomo. Ĉeestis ges-anoj Vondroušek, Friedrich, Kořínek, Adamcová, Borkovec, Bednařík kaj Lorková. Senkulpigis sin s-anoj dro Šikula, prof. Scheiber, Konecká.

S-ano Vondroušek malfermis la kunvenon kaj konstatis, ke ĉiuj problemoj de nia kluba agado, t.e. vizito de gastoj el la ĝemela urbo Győr, la programo por la venontaj 4 monatoj, la enhavo de la Bulteno estis tritraktitaj en tri sinsekvaj laborkunsidoj en aprilo. Oni bedaŭris la nealvenon de la hungaraj gastoj malebligita pro la preparaj laboroj por la Internacia Fervojista Kongreso en Budapeŝto. Ĉiuj aranĝoj preparitaj por ilia akcepto estis nuligitaj ĝustatempe, tiel ke ne ekestis financaj perdoj.

La komitato aprobas aĉeton de 25 ekzempleroj de publikaĵoj "Juĝu mem" kaj "Faktoj pri Ĉeĥoslovakio" (200 pecoj), eldonitaj de Orbis. Oni decidis disdonadi ilin al ĉiuj eksterlandaj vizitantoj de nia Rondeto.

Finite je la 19.55 horo.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri komitata kunveno okazinta la 19an de junio en klubejo en Malnova Urbodomo. Ĉeestis ges-anoj Vondroušek, Friedrich, Kořínek, dr. Šikula, Borkovec, Lorková, Kalina. Senkulpiĝis prof. Scheiber, Podhradská, Bednařík.

Post malfermo fare de s-ano Vondroušek la sama anoncas, ke li skribis pri prunto de libroj por la ekspozicio de Esperanta libro planata por fino de septembro kaj komenco de oktobro. S-ano Vondroušek informas, ke s-ano Šustr promesis volonte ĉion, kion ni bezonos disponigi al ni. S-anoj Friedrich kaj Kořínek estis komisiitaj serĉi konvenan ejon por la ekspozicio. Plue oni traktis pri la programo por la monatoj septembro-novembro. Konekse kun la bedaŭrinda koresponda delikto de unu brua samideano oni bonvenigis proponon de prof. Kilian fari en nia rondeto instrukcian prelegon kun temo "Pri kio korespondi kun eksterlando".

La kunsido finiĝis je la 20.10 horo.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la komitata kunveno okazinta la 2-an de oktobro 1962 en la klubejo en hotelo Slovan. Komenciĝo je la 19,30 h. Ĉeestis ges-anoj Vondroušek, Adamcová, Friedrich, Borkovec, Kořínek, dro Šikula, Lorková, Vaverková, Kalina, Ballay. S-ano Vondroušek parolas pri la planita ekspozicio de Esperanta libro. Estis grandaj malfacilaĵoj por trovi konvenan ejon. S-ano Friedrich demandis en ĉiuj ekspoziciejoj kaj fine troviĝis ebleco instalati la ekspozicion en la freska salono de la Malnova Urbodomo, ejo ne tro granda kaj ne tre konvena. Sed mankis la vitroŝrankoj, kiujn neniu al ni volis pruntedoni: Do ni devis rezigni pri la ekspozicio je la fiksita dato 30.9. S-ano Vondroušek ankaŭ sciigas, ke la membraro malpliĝis kaj ke eble la ekspozicio nin povus helpi vekti intereson pri Lingvo Internacia. S-o Šikula proponas montrofenestran ekspozicion en iu frekventata strato, ekz. ĉe Ingstav en la strato de Venko (tř. Vítězství). Tiun proponon subtenas ankaŭ s-anoj Kořínek kaj Borkovec, ĉar ekspozicion en la Malnova Urbodomo vizitus nur tre malmultaj neesperantistoj. S-o Šikula rekomendas ankaŭ instalati malgrandan libro-ekspozicion en la koridora vitrino de la universitata biblioteko. Tria propono estis akceptita kaj dro Šikula estis komisiita informiĝi pri tiu ebleco kaj eventuale ankaŭ ĉe Ingstav. Poste citas s-o Vondroušek la eksterlandajn vizitojn en nia klubo dum la pasintaj someraj semajnoj. Por la aŭtuna E-kurso provizore enskribiĝis nur 12 personoj, kio ne sufiĉas por la kurso. Enkadrigitajn afiŝetojn transprenis kaj dislokis ges-anoj Adamcová, Vondroušek kaj Kořínek. Kasistan raporton prezentas s-o Borkovec: sur la konto estas Kčs 600,- kaj 600,- ĉe PKR. Bibliotekisto s-o Ballay raportas, ke la biblioteko enhavas nun 500 librojn. Li dissendis 19 admonojn al neredonintojn de prunteprenitaj libroj. S-o Vondroušek diris, ke reputacio de nia teatra kolektivo kreskis; oni ĝin invitas aktori en Ostrava. La elspezojn de la kolektivo pagos nia klubo, kiel promesas s-o Vondroušek. Ĝis fino de la kunsido ne alvenis la sin avizinta estro de PKR k-do Sklenář kaj oni finas la kunsidon de la komitato je la 20.15 h.

Enskribis Jiří Kořínek